



1910. J.

II JARO

15/28 de Novembro

Kaukaza Esperantisto

Duonmonata literatura kaj propaganda gazeto.

Jarabono: 1 rub.—1,06 sm., duonjare 60 kop.—0,60 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub. (6,30 sm.), 1/2 paĝ.—3 r., 1/4 paĝ.—1 r. 50 k., 1/8 paĝ.—75 k., 1/10 paĝ.—50 kop. Adresoj de samideanoj nur 10 kop.

Adreso: Tiflis, Elizavetinskaja strato № 17, Hajk Ter-Astvacatjanc.

Кавказский Эсперантистъ

Двухнедельный литературный и пропагандный журналъ.

Подписная плата: На годъ 1 руб., на 6 м. 60 коп.

Объявленіе: Страница 6 руб. (подстрочно: строка петита 10 коп., передъ текстомъ 20 коп.)

Адресъ: Тифлисъ, Елизаветинская ул. № 17, Айку Теръ-Аствацатрянцу.

ԿՈՎԿԱՍԵԱՆ ԷՍՊԵՐԱՆՏԻՍՏ

ԳՐԱԿԱՆ ԵՒ ՉՐՕԳԱԳԱՆԴԱԿԱՆ ԵՐԿՇԱԲԱԲԱԲԵՐԹ

Բաժնեգիրք տարեկան 1 ռ., 6 ամիսը 60 կոպ.

Տպագրութիւններ երեսը 6 ռ., կէս երեսը 3 ռ., ջառիղը 1 ռ. 50, ութիւրդը 75, տասնուրդը 50 կ.

Հասցեն՝ Քիֆլիս Ելիզաւետինսկայա փ. № 17. Հայկ Տէր-Աստուածատրեանցի:

საქავაზიის სსპერანტისტი

ორკვირეული ლიტერატურა და საპროპაგანდო ჟურნალი.

წლიური ფასი 1 რ., ექვსი თვეთ—60 კაპ.

Редакция открыта ежедневно отъ 5—7 ч. вечера.

Ne diru „li mortis“
Li estas vivanta

Nadson.

Ploras nia patrujo, ploras la tutmondo, ĉar la senkompata morto forrabis de ni ankeran unu homon. Ni perdis grandan verkiston, grandan filozofon. Ni perdis homon, amantan tion belan, bonan, justan. Ni perdis sinceran malmikon de malbono kaj maljusteco, malpaco kaj milito...

Ni ploras, ĉar ni perdis Leon Nikolajevič Tolstoj.

Tiu ĉi okdektrijara maljunulo bataladis dum la tuta sia vivo kontraŭ malvero. Li volis krei ĉe ni surteran paradizon. Li instruis al ni ĝis siaj lastaj tagoj paroli kaj agi sincere kaj vere. Ĉiĉni amiko de popolo, li senhalte bataladis kontraŭ ĝiaj malamikoj...

Komprenante, ke komuna lingvo estas certa rimedo por kunfratigo de ĉiuj popoloj, li defendadis Esperanton.

Li mortis, sed ne mortis liaj sanktaj vortoj kaj ideoj: ili vivos eterne inter la homaro, ĝis kiam ĝi ekzistos en la mondo.

V. S.

GUTETO DA ROSO

La pala burgono
kun rosa guteto
farigis rozeto.

Ĝi estis pala...

Pala estis la burgono...

Mi vidis, kiel ĝi ĝermis sur sia branĉo-patrina kaj ĉiutage frumatane mi

observis kiel la kreskaĵeto sangigis pli kaj pli kaj ĝis burgono.

Kvankam la burgoneto estis pala tamen ĝi estis bela kaj sorĉa.

Ĉiumatene la fresa kaj diafana roso carne karesis la burgonon.

Ĉiumatene en la sama horo, la juna knabino kun pala vizaĝo pamenis en ĝardeno kaj kvazaŭ okaze ĉiam haltadis kontraŭ la pala burgono observadis ĝin kaj murmuretis:

«Ankaŭ vi estas pala? Kial vi estas pala? Ĉu la patrina arbusto estas jam sekiginta kaj ne estas kapabla nutri vin; aŭ la ĉielruĝo rifuzas al vi sian vivigan roson? Ĉu ĝi estas la kadzo? Aŭ eble...?»

Ne finis la virgulino, ĉar en la brusto de l'naturu, sub la ĉielarkbrulaj sunaj radioj, en la profunda trankvileco estis aŭdata la hela kanto de najtingalo.

Ĝi ripozis sur unu rozeta.

«Eble...» murmuretis la virgulino kaj siaj lipoj paligis.

«Jaluzo? ho malfeliĉa burgono!»

Paligis, paligis la burgono, aŭ al la larmplenaj okuloj de l'virgulino ŝajnis tiel.

«Burgoneto! Ankaŭ vi?»

Ĉu vi ankaŭ?

Levigis la juna brusto de l'virgulino ekbatigis sia koro, kie estis enlogintaj du sentoj: bela kaj malbela.

La amo kaj la jaluzo.

La larmoj fluegis el okuloj de la virgulino sur la burgoneton kaj sekigis ĝin.

Kaj al ĉiu sia ĝemo aligis la trilo de najtingalo, kaj sorĉis kun ĉarmo la virgulino kaj la burgoneton kaj duobligis la ĝemojn de malfeliĉa knabino kaj palecon de la tremanta burgono.

«Mi amas lin» paroletis la rozaj lipoj de l'virgulino...

Ĝuna li estas, li estas bela kiel la su-

no, freŝa kiel, vi, kompatinda burĝono sed rigardu tiun rozon sur kiu kantas via dezira najtingalo. Jen alia rozo, malkovrinta siajn foliojn allogis ĝin... la furioza jaluzo sklavigis mian koron kaj konsumis mian tutan estadon... mi deziras roson, guteton da rozo.

Silentis la virgulino.

Kaj en la profunda silento ŝajnis al ŝi, ke ŝi aŭdas kiel murmureton de unu malforta ĝemo.

«Nur unu solan trilon, ĉarma virgulino.»

La burĝono parolis.

Kaj estingis la ĝemon malproksimen en la frumatenan trankvilecon.

Jen du vivoj konsumiĝintaj pro la sama ĉagreno, pro la samaj pasioj jen du vivoj, kiuj ankoraŭ neflorinte devas velki.

Soifas tiuj vivoj.

Sed ve!

La korto de l'najtingalo pli kaj pli igis pasia kaj malprksime kontraŭ la ĝardeno sur la alta balkono estas vidataj du gajaj vivplenaj kreitaĵoj ili ĉirkaŭ preninte unu la alian kun profunda admiro aŭskultis la aman kanton de l'najtingalo sed ne vidis du dolorplenajn vivojn.

La vizaĝo de l'najtingalo estas turnita al ili, kvazaŭ ĝi volas gratuli la paron. La malfermiĝinta rozo, la najtingalo, la virino kaj la junulo, la pala burĝon-virgulino kaj la pala roz-burĝono, jen ses vivoj kun diversaj sentoj... du feliĉaj paroj kaj du malfeliĉaj individuoj...

Pasis tagoj... pasis semajnoj...

Tiuj semajnoj estis centjaroj por la tortura kreitaĵoj.

La virgulino kaj la burĝoneto ĉiam estis palaj kaj konsumitaj.

Sed la horo estis soninta.

La rozo estis maturiĝanta kaj falis la folioj.

Forflugis ankaŭ la purpuruga koloro de la vizaĝo de l'roz-virino.

Kaj unu matene la urĝon-arbetaĵo, kaj la junulo al sia fenestro kun pasia rigardo rigardis la virgulino.

Ve! nek virgulino, nek burĝoneto admiris. Iliaj koroj estis dolorplenaj kaj tiu ŝanĝo tam estis malfrua.

Estingiĝis iliaj vivoj.

Kaj en la sama pozo kiel tiutage, la kapo de l'virgulino estis mallevita al la burĝono kaj ŝi murmuretis:

«Ĝu vi vivos, burĝoneto, rigardu, la najtingalo ĉirkaŭ flugas super via kapo. Ĝia kanto neniam estis tiom allogema, neniam tiuj melodioj estis kantitaj por la alia rozo. Ĉu vi vivos burĝoneto?»

Sentis la burĝono, poste murmuretis:

«Ĉu vi vivos, virgulino? Rigardu la junulon: li forgesis siajn devojn al la roz-virino, nun li bezonas burĝon-virino; li promesas per abunda rozo refreŝigi vian vivon. Via pala vizaĝo fariĝos purpurkolora, kiam liaj rozaj lipoj tuŝetos al la viaj. Ĉi vivos, virgulino?»

La najtingalo kaj la junulo, la velkinta rozo kaj la velkinta virino atentis haltiginte la spiradojn.

«Ne^o. murmuretis la virgulino.

«Ne» murmuretis la burĝoneto.

«Prenu min, ho virgulino! kaj kun mi estu deprenita via vivo».

La virgulino etendis al la arbusto sian tremantan manon kaj desiris la burĝonon.

La virgulino alpremis al siaj lipoj la palan burĝoneton poste al sia brusto, ektermis kaj trankvile falis surteren.

Maldolta rideto aperis sur tiuj lipoj kiaj neniam ricevis kison.

La najtingalo dolore ĝemis, flugis al la burĝoneto kaj trilis sur la virgulina brusto tiujn melodiajn, kiu neniam estis aŭditaj.

La junulo elsaltis al sia fenestro, alproksinigi al la virgulino surgenuigis antaŭ ŝi kaj kisadis ŝiajn lipojn.

La senfolia rozo kaj la roz-virino rigardis tiun bildon.

La virgulino malfermis siajn okulojn, purpure kolorigis ŝiajn lipojn.

La burĝoneto malkovris siajn foliojn kaj ekbrilis ĉarmkoloro kaj... ili ambaŭ estingiĝis.

Ĝi estis la lasta lumo de la estingita lumilo.

Guteto da roso...

Sed estis malfrue...

Verkis kaj esperantigis
Vahan Tiracjan.



LUR-D A -LUR

(Kurda poemo)

de Vrtanes Papazjan

—Lo, lo, lo! pastisto de Nigra-akvo! ĉarma junulo, ploriganta montojn kaj valojn! monta pastisto, malfurioziganta sovaĝbestojn kaj ekscitanta ŝtonojn kaj arbojn! kial vi, kiel frenezulo, konfidis la grandsinjoron? kial vi supreniris alten, sur la turon? Felica: vi estus, se vi ne naskiĝus, Haso! Felica estus, se vi ne aperus en tiun-ĉi mondon; kiu estas plena de grandsinjoroj! Felica vi estus, se vi ne vidus la brilon de la suno, kiu bruligis vin, la ondojn de Nigra-akvo, kiuj konsumigis vin, la balancon de la kanaro, kiu ensorĉis vin.

—Lo, lo, lo! Ĉu kurdo estis tiel malnobla, ke mokis la amon? Ĉu vi perdis la konsciencon? Ĉu li forgesis Dion?

Kial li oferis la malfelican Hason por satano, kaj metis la tutan mondon en ploro kaj funebro?... Lo, lo!

Ha! supreniradis la ŝafoj, opusadis unu la alian; ensorĉitaj de sono de la ŝalmo ili forgesis la malsupran profunde degaĵon. La okuloj turnitaj al Haso ili supreniradis.

La tuta mondo rigardis admirate. La malbona grandsinjoro estis ŝtoniginta, Zalte estis fleksiĝinta, duondorse kaj etendinta la brakojn al Haso. Ŝi ekkriis:

—Mi estas via, Haso! Via eterne! Mi amas vin; mi amas tiom, kiom ne amis. Lejlan Meĝlun-on, Mi amas vin; mi amas tiom, kiom ne amas papilio lampon, najtingalo rozon, tero la sunon, kaj kreskaĵo la teron.

Vi estas mia lampo, vi estas mia rozo, vi—mia suno, kaj vi—mia tero.

Aŭskultis Haso; lia koro preniĝis. Li ludis, pli kaj pli fortigadis la ludon.

Atingis la kondukanta kaprego al la rompita ŝtupo, sentis ke la morto estas antaŭ siaj okuloj; sed ĝi estis ensorĉita, metis la piedon sur la ŝtupon.

Ekmovigis la ŝtupo, aŭdiĝis bleko kaj la belega kaprego, ruliĝante en la aero, iris disrompiĝi sur la ŝtonojn de la abismo.

Kortusiĝis Haso.

—Hej! ah! mia belega kaprego ekkriis li korelfine; sed kiam liaj okuloj falis sur Zalte-n, li forgesis la kapregon.

Li metis la ŝalmon en la buŝon kaj komencis ludi.

La ŝafoj vidis la sorton de la kondukanta kaprego; ili haltis, pensis reiri, sed ili estis ensorĉitaj; iris antaŭen.

Ekprovis la unua safo, repasis, alti-
gis la antaŭajn piedojn, kaj volis salti.
Sed ĝi nur blekis kaj iris tuj post la
leaprego.

„Ah! ah! mia senkulpa safo! ekkri-
ia Haso, li ne vidis la malfermajon en
mezo inter du ŝtupoj. Kion da, am-
o kaj sento, li havis, sugestis en
la salmon, per kolonaturaj li ston-
igis la naturon, sed la safo repa-
dis.”

Ekprovis la tria, ĝa ek saltis, sed
batigis la ŝtupon, faris rondon, blekis
kompe kaj iris al la profunda abis-
mo.

Salto, transpaŝo, miaj helegoj sa-
foj! kantis Haso; salto, miaj lancaj
ŝafidoj, venu al via mastro!

Sed la safo ne movigis plu, repa-
sis, furiozigis Haso, li ne vidis la mal-
fermajon en mezo inter du ŝtupoj.

Kion da, am o kaj sento, li havis, suges-
tis en la salmon, per kolonaturaj li sto-
nigis la naturon, sed la safo repa-
dis.

Ekhontis la grandinjono pra sia a-
fero, duonmortis Zalhe, pro malespero.

Haso sangis la motivon.

Li mem ne scias nun, kion li ludas.

La vento ĉesis, la akvo haltis, ĉio
silentis.

Kiu ne aŭdis „Lur-da-lur“, kion po-
yas elteni nenia ŝtonkoro? aŭdinte ki-
on, batadas kaj estingigos koro aman-
ta; aŭdinte ĝin, frenezigos amanta fili-
no, frenezigos kaj ekkuras rapide, al
sia amato.

Ĝi estas mirinda, ĝi estas la gloro
de kantoj.

Ĝi estas la murmureto de anĝeloj,
l'animo de Haso.

Movigis la safoj, ruliĝis kaj falis
multaj.

Ekmovigis ankaŭ Haso, kliniĝis kaj
ekvidis la malfermajon.

Li korjektis ĉion, rigardis la grand-
sinjoron.

Li sentis, ke Zalhe jam estas perdi-
ta por si, kaj li mem-por la mondo.

Ekmovigis ankaŭ Zalhe, rigardis la
grandinjoron, rigardis Hason.

Ŝi sentis, ke Haso jam estas perdi-
ta por si, kaj ŝi mem-por la mondo.

Kaj ĉio silentis...

„Lur-da-lur“ ĉesis, la lasta vibro de
ĝia noto forflugis morti en la aero...

Poste... aŭdigis ĉekkrio.

Kaj du korpoj, ruligante rapide en
la aero, kuniris disbatigi en la profun-
de de l'abismo... en la brakoj unu de
alia.

Ili estis Haso kaj Zalhe.

El armena lingvo tradukis

S. Hajjan



LA MATENO DE AFERISTO.

(De Gogol)

I

Kabineto; kelke da ŝrankoj kun libroj;
sur la tablo estas disjetitaj dokumen-
toj. Johano Petroviĉ, aferisto, sin elti-
rante, eliras en ĥalato kaj sonorigas.
El antaŭcambro estas aŭdata voĉo:

„tuj!“ Johano Petroviĉ sonorigas la
duon fojon—ree sama voĉo: „tuj!“ Jo-
hano Petroviĉ senpacience sonorigas
trifoj; eniras servanto.

Johano Petroviĉ. Ĉu vi surdigis?

Lakeo. Ne.

Johano Petroviĉ. Kial vi ne bonvo-
lis aperi, kiam mi sonorigas trifoj?

Lakeo. Kion do mi povis fari: mi ne
povis lasi la aferojn—mi purigis botojn.

Johano Petroviĉ. Kion do faris Jo-
hano?

Lakeo. Johano balais ĉambrom, kaj
poste iris en la ĉevalojon.

Johano Petroviĉ. Venigu hundeton!

(Lakao alportas hundeton): Zjuzjunjo! Zjuzjunjo! Jen mi alligos al la vosto papereton. (Li alligas papereton).

(Enkurta alia lakeo) Aleksandro Johanoviĉ!

Johano Petroviĉ. Invitu! (Forlasas rapide la hundeton kaj malfermas La Legatorn).

II

Johano Petroviĉ kaj Aleksandro Johanoviĉ (ankaa aferisto).

Aleksandro Johanoviĉ. Bonan matenon, Johano Petroviĉ!

Johano Petroviĉ. Kiel vi fartas Aleksandro Johanoviĉ?

Aleksandro Johanoviĉ. Mi tre dankas. Ĉu mi ne malhelpis al vi?

Johano Petroviĉ. Ne! Mi ja ĉiam estas okupita. Nu, ĉu kioma horo vi alveturis hejmen.

Aleksandro Johanoviĉ. Estis la sesa kiam mi turnis de la strato Oficira, mi demandis, alveturante al budetisto: „Ĉu vi ne aŭdis, fratulo, kioma estas horo?“

„La sesa jam estas“ respondas li. Jen mi eksciis, ke jam estis la sesa horo.

Johano Petroviĉ. Prezentu al vi mi samtempe alveturis hejmen! Nu, kia estis la visteto, he, he, he?

Aleksandro Johanoviĉ. He, he, he! Mi konfesas, ke ĝi al mi eĉ dum sono prezentigis.

Johano Petroviĉ. he, he, he, he! Mi rigardas, kion tio signifas, ke li metis reĝkarton? mi ja havas en miaj manoj daintref karton, kaj ĉe Lukjano Fedosejeviĉ, mi loge vidas, ke estas renon-
86 (ludo)

Aleksandro Johanoviĉ. Plej longe daŭris la oka roberto.

Johano Petroviĉ. Jes! (Silentinte). Mi jam palpebrumas al Lukjano Fedosejeviĉ, por ke li atutu—ne. Se li atutus valetkarton, mi pikkartoj gajnus.

Aleksandro Johanoviĉ. Ne, Johano Petroviĉ la valetkarto ne gajnus.

Johano Petroviĉ. Gajnus.

Aleksandro Ioanoviĉ. Ne gajnas, ĉar vi neniel povus premi en la manon.

Johano Petroviĉ. Ĉu vi forgesis sepon-pikkarton ĉe Lukjano Fedosejeviĉ?

Aleksandro Johanoviĉ. Ĉu li havis pikkarton! Mi ne memoras.

Johano Petroviĉ. Certe, li havis du pikkartojn kvaron, kiun li metis sur damon, kaj sepon.

Aleksandro Johanoviĉ. Ne, Johano Petroviĉ, li ne povis havi pli ol unu pikkarton.

Johano Petroviĉ. Ha, mia Dio, Aleksandro Johanoviĉ, al kiu mi tion diras! Dupikkartojn! mi kiel tuj memoras kvaron kaj sepo.

Aleksandro Johanoviĉ. Kvaron estis ĝi estas certa, sed sepo ne estis. Li ja atutis, konfesu vi mem, li ja atutis?

Johano Petroviĉ. Je Dio, Aleksandro Johanoviĉ. Tio estas tute nebla afero.

Johano Petroviĉ. Sed tamen, Aleksandro Johanoviĉ, jen kio estas plej bone: veturu morgaŭ al Lukjano Fedosejeviĉ. Ĉu vi konsentas?

Aleksandro Johanoviĉ. Bone.

Johano Petroviĉ. Nu, mi demandos lin persone, ĉu li havis en sia mano seppikkarton?

Aleksandro Johanoviĉ. Bone, mi konsentas. Cetere, se oni ĵugos, strange estas ke Lukjano Fedosejeviĉ ludis tiel malbone. Oni ja ne povas diri, ke li estas sen sago. Li estas persono komprenanta kaj gentila.

Johano Petroviĉ. Ankaŭ vi aldonu li scias multe! tiuj personoj, ni diru sekrete, estas malmulte en Rusujo. Ĉu vi estis ĉe lia altekscelenco?

Aleksandro Johanoviĉ. Mi estis. Mi ĵus eliris el lia domo. Hodiaŭ matene estis iomete malvarme. Mi ja, kiel, mi pensas, vi ŝcias, ordinare vestas alkan

kamizolon: ĝi estas multe pli bona ol flanela kamizolo, kaj krom tio ĝi ne varmegas. Tial mi ordonis alporti al mi mian pelton. Mi alveturas al la altekscelenco ankoraŭ dormas. Tamen mi atendis. Nu, ni komencis rakontadi tion, alian.

Johano Petroviĉ. Ĉu nenio estis dirita primi?

Aleksandro Johanoviĉ. Jes, estis dirita ankaŭ pri vi. Kaj tre interesege interparol estis.

Johano Petroviĉ. (Vivigas), Kio, kiel?

Aleksandro Johanoviĉ. Permesu, permesu rakonti laŭorde. Estas tre interesa okazo. Lia altekscelenco, interalie demandis, kie mi estas, ke li ne yidas min tiel longe? kaj li deziris ekscii pri hieraŭa vesperkunveno kaj kiu estis. Mi diris. „Estis, via altekscelenco, Paŭlo Grigorjeviĉ Borščov, Ilja Vladimiroviĉ Bubunicin“. Lia grandekscelenco post ĉiu vorto diris: „hem!“ Mi diris. „Kaj ankoraŭ estis unu konata al via altekscelenco...“

Johano Petroviĉ. Kiu li estis?

Aleksandro Ioanoviĉ. Permesu! kion vi pensas, kion diris pri tio lia altekscelenco?

Ioano Petroviĉ. Mi ne scias.

Aleksandro Johanoviĉ. Li diris: „kiu li estas?“ Johano Petroviĉ Barsukov mi respondis. „Hem!“ diris lia altekscelenco: „li estas oficisto kaj krom tio... (Levas siajn okulojn supren). Sufiĉe bone viaj plafonoj estas pentritaj: kiu faris la elspezojn: vi mem aŭ la dommastro?“

Johano Petroviĉ. Ne, tio-ĉi ja estas regna loĝejo.

Aleksandro Johanoviĉ. Tre, tre estas nemalbone: korbetoj, ĉirkaŭ estas biskvitoj, tintiloj kaj tamburo! estas tre, tre nature!

Johano Petroviĉ. (senpacience). Kion do diris lia altekscelenco?

Aleksandro Johanoviĉ. Ho, mi forgesis. Kion li diris?..

Johano Petroviĉ. Diris „hem!“ lia grandekscelenco: „li estas oficisto...“

Aleksandro Johanoviĉ. Jes, jes: li estas oficisto...“ nu, „kaj servas ĉe mi“. Post tio la interparolo ne estis jam tiom interesa kaj ni komencis paroli pri ordinaraĵ aferoj.

Johano Petroviĉ. Kaj plu nenion li parolis pri mi?..

Aleksandro Johanoviĉ. Ne.

Johano Petroviĉ. (sen si mem). Nu, dume estas ankoraŭ ne multe. Dio, mia Dio! nu se li dirus: „Tiun ĉi Barsukovon, estimante la jenajn kaj jenajn kaj ceterajn liajn servojn mi prezentas...“

(Finota). El la rusa lingvo tradukis A. ARUMOV.

Въ редакціи журнала „Кавказскій Эсперантистъ“, Елизаветинская ул. № 17, продаются слѣдующія книги:

1. Kato en botoj, tr. de V. Sirun. 10 k.
2. Hundo kaj kato „ „ 10 k.
3. Rondaj Dioj „ „ 3 k.
4. Ekzercar. Esperanta, de V. S. 5 k.
5. Nino, tr. de V. Gogitidze . 3 k.
6. Դասագիրք հայերանո լիզուի և ՏԷՐ-Աստուածատրեանի . 25 k.
7. Բարարան հայերանո-հայերէն և Տ.-Աստուածատրեանի 50 k.
8. Полный учебникъ Эсперанто, В. Сирунянъ . 12 к.
10. Հայերանո միջազգային լիզուի Ա. Օհանջանեանի . 3 k.
11. Esper. Legolibro de A. Fiŝer 30 k.
12. I. Turgenev. Kanto de triumfanta amo, tr. A. Fiŝer . 25 k.
13. „ „ Anjo (Ася) tr. de A. Fiŝer kaj V. Zamjatin . 25 k.
14. Poŝtkartoj kun portreto de L. Zamenhof po 2 k./100 eks. 1 r. 70 k.

При требовании больше 10 экз. дается 20% скидки. Пересылка за счет покупателя.

Vin mi kantas

Vin mi kantas, ho, herooj de l' laboro,
 Kiuj eiam, kun vundita dolorkoro
 Dum tutvivo por panpeco laboradas,
 Kontrati krima bezonego bataladas,

Vin mi kantas!

Vin mi kantas, suferantaj almozuloj,
 Ho, fizitaj, forgesitaj malsatuloj,
 Mutfiantome kiuj sen la protestvorto
 Turmentigas sub la ŝarĝo de la sorto,

Vin mi kantas!



Juna poeto **Š R I N D** (Kunlaboranto „Kauk. Esp.“)

Vin, ho, fratoj malamantaj sklavkatenon,
 Kiuj por de l' nova vivo la mateno
 Jam arogis forforjети de l' humero
 Servutjugon... nun toleras malliberon,

Vin mi kantas!

Vin, martiroj de popolo, aĉceptintaj
 Krucon pro la ide' sankta kaj celita,
 Kiuj falis en batalo kun mallumo
 Kaj tiele montris belan, belan lumon,

Vin mi kantas!

Šrind.

FORLASITA

De M. Manneljan.

Tutan semajnon ni estis logantaj en apudaj ĉambroj. Mi sin ne konas. Nur foje mi sin renkontis sur la ŝtupo de ŝtuparo: ŝi rapide, ne rigardante min supreniris. Ŝi tiom rapide foriris apud mi, ke mi ne povis vidi ŝian vizaĝon. Ŝajne, ŝi evitadis de mi.

Kiu ŝi estas?

Kiam mi estis nur luinta ĉambrom, iame el ŝia ĉambro mi estis aŭdanta viran voĉon, sed jam longe ĉi voĉo ne estas aŭdata.

Estis vespero. Sidinte en mia ĉambro mi min okupis, kiam subite mi ekaŭdis ke je alia flanko de muro ŝi ploras; mi starigis kaj per ekscitiga atento eksilentis. Tie estis ŝi.

Ŝi ploris sole, tiom elkore, ke mi momente ekpensis iri, frapi pordon, demandi la kialon de ŝia sufero, kaj se ekpovos—per io helpi al ŝi.

Min serioze komencis interesi ŝi; mi jam prezentis ŝin al mi pala, malhela kun petegemaj okuloj, klara vizaĝkonturo; ŝia voĉo versajne estas ĉarma; mi ne scias kial, sed ŝajnis al mi, ke tagon ŝi venos al mi... Ĉiutage mi ŝin atendadis, sed ŝi ne estis venanta.

* * *

Hodiaŭ el ŝia ĉambro estis aŭdanta bruo. Mi aŭdis vorterojn, sed sencon ne povis komprenigi. La parolinto estis la dommastrino; ŝi parolis maldeklitate, sed „ŝi“ petadis, petegadis; iom poste „ŝi“ ree komencis plori, kaj mi ekaŭdis la vortojn de la mastrino „ĝis margaŝa mateno!“—kaj la bruan fermon de pordo. Iom poste, sen frapo de pordo al mi eniris la natjara knabo de la mastrino.

—Kion vi volas?

Fraŭlino demandis, ĉu vi ne scias kiam vagonaroj venas Tifison?

—Tuj mi rigardos. Por kio vi tion bezonas?

—Jen, tiu fraŭlino petas.

Mi ekrigardis la gazetojn kaj diris la horojn de venoj de vagonaroj.

—Ĉu vi ekmemoros? prenu gazeton.

La pordo mallaŭte malfermiĝis, kaj mi vidis kapon kiu timeme malaperis.

—Bon volu!

—Pardonu...

—Bonvolu, mi petas...

Ŝi venis ĉambrom, kaj ion konfuziĝinte haltis silente, kvasaŭ deziris diri ion, sed ne kuragis.

—Vi estas demandinta la horojn de veno de vagonaroj? Jen, mateno je 1' naŝa, kvaran de tago, kaj nokte je 12-a.

—La 12-an ankaŭ? Dankon...

—Jes, ĉu vi iun atendas?

—Li promesis... Antaŭ kvin tagoj li devis esti tie ĉi, sed jen jam... kvin tagoj... sed li malestas...

—Sidigu mi petas.

—Dankon!

Ŝi sidigis. Iom silentinte ŝi volis diri ion, sed ne kuragis.

La malgrandulo, vidante ke li ne estas bezona, foriris.

—Vi versajne estas maltrankvila, ke li malfruigis?

—Jes, komprenéble, jam estas 5 tagoj ke mi atendas lin. La mastrino pli maltrankviligas. Ŝi deziras ludoni la ĉambrom al alia.

—Sed... do... vi mem tie logas?!

—Jes, sed la limtempo jam estas veninta, mi nenion havas, kion mi donu. Li iris, promesante post 15 tagoj reveni. Li forveturis 18-an, sed hodiaŭ estas 6-a.

—Versajne io estas malhelpinta al li. Kien li veturis?

Mi ne scias. Li ne diris al mi. Li diris nur ke estas ricevinta telegramon, ke lia patrino estas malsana, kaj li devas farveturi.

—Li ankoraŭ povas reveturi! Eble io okazis.

—Jes!—goje ekkriis ŝi, li venos, jes? li venos?! Mi ankoraŭ diras al la mastredzino: li povas resti nur 15 tagojn. La forpermesan ateston li montris al mi. Do li povas esti senigata de ofico. Ĉu li povis tiel min trompi?

—Kiu estas li?

—Li?... Mi vivis kun li... mi volis... mi amis lin... li ankoraŭ min amis! Li estis honesta homo, mi ne povas kredi ke li estas perfidinta al mi! La mastro diras, ke li ne plu revenos. Sed kiel do mi povas kredi? Ja... mi pro li forlasis ĉion, patrinon, fratinojn, fratojn... Mia patrino malbenis min... Se miaj fratoj renkontos min, ili min mortigos.

Ŝi ekmentis kaj alprenis nazukon al la okuloj.

—Ĉu jam estas longe ke vi vivas kun li? post ioma silento demandis mi.

—3 monatoj kaj 10 tagoj... Kion do mi nun faru? eĉ spersedkon ne havas mi. Antaŭ la forveturo li proponis al mi 10 spesmilojn, sed mi ne prenis. Kial do preni? La ĉambropago por 15 tagoj jam estis pagita. ĉio estis. Kial mi devis preni? Sed... kion mi nun faru?...

—Ĉu vi havas konatojn? Neniun?

—Neniun, neniun. Si min forpelos el domo, kaj mi restos sur la strato...

—Rejru hajmen?

—Ne, ne...

—Ili povas pardoni, vian eraron...

—Ne, restas sole strato, strato...

—Kaj si komencis ploregi.

Mi ekprovis trankviligi ŝin, diris ke ŝi ne maleperu, ke li ankoraŭ povas veni, —sed nenio povis helpi.

—Jen trinko akvon, trankviligu!

Ŝi ektrinkis, gluton, malloxis sian kapon kaj alprenis tukon al okuloj.

—Kiel, kiel oni povas kredi al ho-

moj?... Li do ja juris, ke li amas min! Mi eĉ ne deziris rigardi ĵur, neniu estis ekzistanta por mi. Li estis por mi dio... sed... sed... forlasis min kaj foriris. Forirante kion li petis la mastro diris ke ŝi bone rilatu kun mi, ne permesu al mi malgoji... sed... perfidis...

Tio estas neeble! Mi ne kredas... ne kredas! Li tion ne faros!

Oni kelkfoje ekfrapis la pordon.

—Eniru, diris mi.

Eniris la mastro:

—Diru vi, kion mi faru? Mi do ankoraŭ estas malriĉa virino, per tio mi vivas. Nu bone! permesu mi al ŝi tagon, duan, trian, do mi ne povas ĉiain.

—Jes, sed vi atendu kelkajn tagojn ankoraŭ, eble li revenos.

—Mi diras al vi, ke li ne revenos plu. Hodiaŭ mi estis ĉe lia kolego. Li diris: forpelu ŝin, iru kien volas ŝi mem! Li plu ne venos! Kion do plu vi deziras?

La fratino denove komencis plori. Post momento ŝi rapide levigis kaj ne dirante eĉ vorton, eliris.

—Kion do mi faru? Kion do mi povas fari?

—Ĉu ŝi estas perfidinta?

—Kompreneble jes! perfidinta! kaj forkurinta! kanajlo! Vi vidu kiaj en la mondo ekzistas homoj! Kion nun faru ŝi? Malfeliĉulino! Mi mem ankoraŭ bedaŭras, sed do mi ne povas ŝin senpago nutri! Mem mi estas malfeliĉa virino, tiel mi vivas, do... mi ne povas!! Diris ŝi kaj foriris.

—Tiu vesperon mi dormis maltrankvile. Mia najbarino estis tre maltrankvila. Ion ŝi faris. Iame estis adate ŝia ploro.

—Matene frue mi ankoraŭ estis dormanta, kiam kvazaŭ emsonga min ek-

disbruaĵon. Mi tuj vekigis. El la najbara ĉambro estis aŭdebla interparolo, netrankvileco. Mi baldaŭ vestigis kaj iris tien. Apud la pordo estis amasigintaj viroj kaj policanoj.

— Kio okazis? — demandis mi la unuan renkotiton.

— Ir' pendigis.

— Kiu? Kial?

— La juna virino. Estas interese, kio okazis?...

El/ armena lingvo tradukis
Shiro's Tirojjan

BIBLIOGRAFIO

Замѣтка о введеніи въ элементарную математику. Jacques Camessasse (Жакъ Камескасъ). Парижъ, книжка торговли Hachette et Co. 1910.

Уже давно чувствуется въ обществѣ потребность нагляднаго изученія всёхъ предметовъ и наукъ. Вообще учащаяся молодежь, въ особенности дѣти, лучше усваиваетъ, въ большинства случаевъ, объясненія тѣхъ или иныхъ предметовъ, которые болѣе наглядны и доступны непосредственному изученію. Такъ, вида передъ собой члѣтъ предметъ, о которомъ ученики имѣли прежде только теоретическое понятіе, они послѣ нагляднаго созерцанія усваиваютъ его съ большимъ интересомъ и понятіемъ. Поэтому-то долгъ всякаго учителя объяснять предметы не какъ *ничто* абстрактное, а наоборотъ, какъ конкретное, и въ болѣе или менѣе практическомъ примѣненіи къ жизни.

Авторы „введенія“, напримѣръ, протестуютъ противъ преподаванія исторіи въ первыхъ приготовительныхъ классахъ школы. Онѣ въ дозатель-

ство своей правоты въ этомъ сужденіи, привести слѣдующее изъ ученической жизни: „Преколько мѣсяцевъ тому назадъ въ Парижѣ я слушала семилѣтняго мальчишя, ученика городского училища, отвѣчающаго своей матери *наизусть* урокъ по исторіи, о собраніи генеральныхъ штатовъ 1614 года. Когда же я его спросила: „знаешь ли ты, что такое собраніе генеральныхъ штатовъ?“ онъ остоябенѣлъ, сталъ въ тупикъ, долго смотрѣлъ на потолокъ, и наконецъ свавалъ: „Ахъ! я дальше еще не знаю“. Однако онъ зналъ урокъ наизусть роскошно, и получилъ даже въ концѣ учебнаго года премію первой степени по исторіи. Ну, какая же польза!

Этотъ фактъ наводитъ автора на другой аналогичный случай: „Немного лѣтъ тому назадъ я хотѣлъ узнать латинское слово „да“. Я не знаю, существуетъ ли оно въ латинскомъ языкѣ или совершенно отсутствуетъ, такъ какъ я его не нашелъ въ моихъ словаряхъ, но дѣло въ томъ, что значеніе этого слова никто не зналъ; кого только я не спрашивалъ. Между спрошенными мною субъектовъ были и абитуриенты (у которыхъ въ недѣлю 6 уроковъ латинскаго языка, и изучаютъ послѣдній въ продолженіе 6 лѣтъ), и окончившіе университетъ. Этотъ фактъ наглядно намъ показываетъ — насколько сухо ведется преподаваніе этого языка въ частности и вообще многихъ другихъ предметовъ. Хотя и изученіе латинскаго языка не имѣетъ ровно никакой пользы для повседневной нашей жизни, но однако манера преподаванія этого языка должна быть непременно перемѣнена, чтобы съ одной стороны сдѣлать этотъ предметъ болѣе интереснымъ и съ другой облегчить трудъ учащихся при его изученіи.

ტად ობიექტიური იყოს, მეტად გასაგები, რომ პაწიები პირველ კლასიდანვე დაინტერესდნენ სულითა და გულით. „შესავალი ელემენტალურ მათემატიკაში“ შეძლებას გვაძლევს გაგებით შევისწავლოთ ელემენტალური მათემატიკა.

ეს „შესავალი“ წარმოადგენს თითქმის დაწყობილ კუბების სათამაშოს, რომელთა რიცხვი 1200 და რომელთა შემწვობითაც შესაძლებელია ბევრი რამ შევისწავლოთ ანგარიშიდან, ალგებრიდან და გეომეტრიიდან. ამ თამაშობას სამი განსაკუთრებული თვისება აქვს: ა. მკითხველს ვააცნობს ერთსა და იმავე დროს ათეულ თვისის პრინციპებს გეომეტრიის ელემენტების ფორმებს (მეტრიული სისტემა); ბ. საშუალება კომბინაციისა ამ ელემენტების—მარტივია. მარტო ორი გვარია ელემენტებისა შრავალ სხვა და სხვა შეკრებილობებისათვის; გ. გვაძლევს საშუალებას დაეთვალოთ თითქმის სწრაფად და ავტომატიურად სხვა და სხვა შეკრებილობები. ყოველი უმნიშვნელო შეცდომა მაშინვე აჩენს სიჭარბეს თუ ნაკლებობას კუბებისას.

ამგვარ გამოანგარიშების წესით ახალი „გამოგონება“ კამესკისა დიდ სარგებლობას მოუტანს მათემატიკის შესასწავლად.

ვურჩევთ ყველას ეს აპარატი შეიძინონ, როგორც საუკეთესო საშუალება მათემატიკის საუბუძლიანად შესწავლისათვის.

ივ. კარბელაშვილი.

Alvoko

al ruslandaj esperantistoj.

(Pri la Ruslanda Esperantista Adresaro).

Por iom klarigi la disvastigon de nia kara lingvo en Ruslando, Moskva studenta grupo «Esperanto» ĉe la Uni-

versitato nun jam prilaboras «La Ruslandan Esperantistan Adresaron» Tial en la 5 № de la gazeto «La ondo de Esperanto» ruslandaj esperantistoj estis petataj, ke ili sendu siajn adresojn por la eldonota en la fino de l'nuna jaro Ruslanda Esperantista Adresaro. En sekvo de tiu ĉi peto ni ĝis nun ricevis jam multe da adresoj, sed ni scias, ke pli multe ankoraŭ ni ne ricevis. Pro tio ni denove rememorigas niajn samideanojn pri la sendo de iliaj adresoj, ĉar la entreprenata eldono havos tre gravan signifon por nia afero: ĝi montros tiujn punktojn de Rusujo, kien ni devos direkti niajn ĉefajn fartojn.

En la Adresaro estos presitaj la adresoj de ĉiuj esperantistoj, loĝantaj en Ruslando, sendepende de ilia nacieco: rusoj, tataroj, poloj, armenoj, finnoj, k. t. p.

La redaktado de la adresaro finiĝos en la fino de oktobro; al tiu ĉi limtempo ni petas sendadi la adresojn.

Krom la adresoj de privataj personoj ĝi enhavos ankaŭ la adresojn de ekzistantaj en Rusujo esperantistaj societoj, grupoj, lernejoj, kursoj librejoj, bibliotekoj k. t. p. Pro tio ĉiuj similaj organizaĵoj estas petataj sendi pri ili la plej detalajn sciigojn laŭ la programo: 1) nomo de organizaĵo; 2) tempo de ĝia fondiĝo; 3) nomo de gvidantoj; 4) nombro de anoj; 5) ilia nomaro kun la adresoj; 6) tagoj de kunvenoj k. t. p. Ĉion sendu laŭ la adreso: Москва, Тверская, 26, Книжный магазинъ «Эсперанто». В. С. Боднарскому (для Ruslanda Esperantista Adresaro).

Redaktoro de la Adresaro (Prezidanto de l'Moskva studenta grupo „Esperanto“) V. Bodnarski.

Kelkaj korespondantoj kiuj deziras korespondadi kun mi ne skribis siajn adresojn. Tial mi ne povas respondi.

Mi sciigas ĉiujn korespondantojn ke ili skribu siajn adresojn plene kaj legeble.

Arkadio Arumov.

Tiflis (Ruslando) str. Kočubeja, 6.

La 2-an linion en la 3-a strofo de la versaĵo de S-o B. Michalik „Esperanto super ĉio!“, presita en № 10-11 de „K. E.“ oni legu:

„Kara lingvo!—Estu ĉiuj aspirataj nun de ĝi!“

KORESPONDADA FAKO

En tiu-ĉi fako estas presataj adresoj de la personoj, kiuj deziras korespondadi kun gesamideanoj per simplaj poŝtkartoj (SP) aŭ per ilustritaj (PI) aŭ per leteroj (L) aŭ interŝanĝi poŝtmarkoj (PM).

Krasnojarsk (de Enisejska ĝub. Siserio—Ruslando) Mihailo Borisov deziras korespondi kun kaŭkazaj samideanoj. Persaj kaj Turkaj armenaj samideanoj. Mi ĉiam tuj respondos.

Tabriz (Persujo). s-ro A. Ter-Hovhansjanc (la Banque Imperiale de Perse) deziras korespondadi kun samideanoj per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj. Ĉiam respondos.

RESPONDOJ

Gravenhage—Librojo „Espero“ Ni rifuris akcepti vian poŝtpaketon, ĉar nia poŝto alportis al ni nur la ŝildon de kalendaro. Bona okazo estas konsili al ĉiuj la barberolojn sendi en Rusujon nur rekomendite.

Van.—Garegin Gazazjan. Baldaŭ ni sendos al vi novajn. Bonvoln storobi redakcio pri la esperanta disvastiĝado en Vana vilaje vilajetlao.

Hamburg.—B. Michalik. Ricevis, sed ni ne povas plenumi vian peton,—nur ni presos pri la eraro. Bonvolu skribi pri ĝi kuponoj.

Redaktoro—Eldonisto

H. Ter-Astvacatrjane

Анонсој

Учбеник о речн јединицама и о значењу речи

ЕУТЕРУБСОВСКИ

180 стр. 7 руб. 2 коп.
50 стр.—80 коп. 100 стр.—1 руб. 60 коп. 200 стр.—3 руб. 40 коп.
Значајна литература и др. др.

Вышла из печати книга

СЧЕТОВОДСТВО

ОБЩЕСТВЪ ВЗАИМНАГО КРЕДИТА.

Цѣна 2 р. 50 к. безъ пересылки.

Составилъ **А. Арумовъ**, основатель Второго Тифлискаго О-ва „Взаимнаго Кредита“

Продаются: 1) у автора: Тифлисъ, Закавказское Отдѣленіе Крестьянскаго Поземельнаго Банка и 2) въ книгоиздательствѣ и книжномъ складѣ „Коммерческая Литература“ С. Петербургъ, Екатеринофскій пр. 8.

